# *ALBA kaj Petrocaribe esploros eblan ekonomian zonon.*

La membrolandoj de la Bolivara Alianco por la Amerikoj (ALBA) kaj de la energetika interkonsento Petrocaribe pintkunsidos en Karakaso por ebla subskribo de traktato inter amba? organiza?oj kaj kreado de ekonomia zono.

De anta? kelkaj tagoj, la ministro pri eksteraj rilatoj de Venezuelo, Elías Jaua esprimis ke “finfine oni diskutos kaj eble jam estos pretaj subskribi la konsistigan traktaton Eco-ALBA, ekonomia spaco de nia Alianco kaj avanci en la kreado de la ekonomia zono kun Petrocaribe.”

La venezuela ministro klarigis ke oni konfirmis la partoprenon en la pintkunsido de la prezidentoj Rafael Correa de Ekvadoro; Evo Morales de Bolivio; Daniel Ortega de Nikaragvo; Danilo Medina de Dominika Respubliko; Dési Bouterse de Surinamo kaj Michel Martelly de Haitio.

Oni atendas la partoprenon de ?tatestroj kaj altrangaj funkciuloj de la karibaj landoj kaj Sudameriko kiuj partoprenas en amba? organiza?oj.

La speciala ekonomia zono estis proponita de la venezuela prezidento Nicolás Maduro en la pintkunsido de ALBA okazinta en Ekvadoro la pasintan julion.

Dum la pintkunsido oni anka? pritraktos eventualan rilaton inter la komuna merkato de la Sudo (MERCOSUR), organo kiun Venezuela nuntempe prezidas kaj la speciala ekonomia zono.

---

http://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/8753-alba-kaj-petrocaribe-esploros-eblan-ekonomian-zonon

# Radio Habana Cuba